
Oldřich Kníchal

# KOMENIO
# kaj la internacia lingvo



En la jaro 1970, kiun la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj proklamis je la propono de UNESKO "Jaro de la Internacia Edukado", oni rememoris en ĉiuj mondanguloj la 300-an mortojubileon de la granda ĉeĥa pedagogo Johano Amoso Komenio.

Pri la graveco de tiu ĉi personeco parolas ankaŭ la rezolucio de la Ĝenerala Asembleo de UNO. Ĝi emfazas eminentan kontribuon de Komenio al la progreso de la homa penso kaj precipe a1 la evoluigo de la edukado, kiu estas grava rimedo por atingi pli perfektan interkompreniĝon de la nacioj. La rezolucio alvokas ĉiujn ŝtatojn-membrojn de UNO rememori la verkon de tiu ĉi reprezentanto de 1a eŭropa civilizacio de la 17-a jarcento.

**I. VIVO KAJ VERKO**

Johano Amoso K o m e n i o (ĉeĥe Jan Amos Komenský, latine Comenius, legu Komenius) naskiĝis la 28-an de marto 1592 en urbeto Nivnice apud urbo Uherský Brod (Sudmoravia regiono, Ĉeĥoslovakio), mortis la 15-an de novembro 1670 en Amsterdamo. Elstara ĉeĥa ĥlozofo, fondinto de la moderna pedagogio, ĉefa reprezentanto de la ĉeĥa kulturo en la deksepa jarcento.

Post la studoj ĉe la universitatoj en Herborn kaj Heidelberg (FRG) li vivis dum kelkaj jaroj en la moravia urbo Přerov (legu Prĵerov) kiel instruisto de la "Unuiĝo de Fratoj" (1) kaj pli poste kiel pastoro en Fulnek. En la jaro 1620, kiam estis venkita la bohema protestantismo, Komenio devis kun miloj da samkonfesiuloj forlasi sian patrujon. Kiel ekzilito li vivis en Leŝno, la tiama pola sidejo de la Unuiĝo (1628-1655), intertempe restadis en Britio (1641-1642), Svedio (1642-1698), en la teritorio de la hodiaŭa Slovakio (1650-1654) kaj ĥne en Nederlando (1656-1670), kie li estas entombigita. A1 tiuj ĉi landoj, precipe al Svedio, li estis invitita por reformi tie la lernejaron kaj la publikan vivon laŭ siaj proponoj.

Komenio estas konata ĉefe kiel granda pedagogo, sur kies principoj ankoraŭ hodiaŭ staras la moderna lernejsistemo kaj pedagogia scienco. Lia unua mondfama verko estis "Ĉeĥa didaktiko" (1632), pli poste reverkita en la latina sub la titolo "Didactica Magna" (legu didaktika magna) - Granda didaktiko. Vastan eĥon atingis la prilingvaj verkoj kaj lernolibroj de Komenio: "Janua Linguarum Reserata" (Pordego de la lingvoj malfermita, 1631), kaj "Orbis Pictus" (orbis piktus) - Mondo en bildoj, 1658. Siajn pedagogiajn verkojn Komenio eldonis en unu kolekto en Amsterdamo sub la titolo "Opera Didactica Omnia" (Ĉiuj didaktikaj verkoj, 1657).

Dum sia tuta vivo Komenio okupiĝis pri la ideo de reeduko de la homa socio surbaze de morala kaj racia edukado de la homoj. Liaj porpacaj kaj humanismaj klopodoj, lia kredo pri la bona estonteco de la propra nacio kaj interfratiĝo de ĉiuj popoloj, respeguliĝis ankaŭ en liaj traktadoj kun politikaj reprezentantoj de la tiama Eŭropo. Tiun ĉi lian agadon rilatas la ampleksa kaj nefinita verko "Ĝenerala Konsulto pri la Rebonigo de la Homaj Aferoj", kies kvina parto "Panglottia" estas dediĉita al la problemo de universala lingvo.

## II. PORPACAJ KLOPODOJ

Komenio estis akra kritikanto de la sociaj malpravaĵoj de la militoj, servante al la pacideoj per siaj verkoj, kiel ekzemple en La vojo de la paco aŭ en la Vojo de la lumo (Via lucis). En la lasta li proponas krei internacian sciencistaron por komuna solvado de la scienc- kaj pacproblemoj, kies tasko estus gardostari al la paco, al feliĉo de la homa gento, kaj serĉi la vojon de la saĝo por paco sur la Tero.

Unu aspekto de la verko estas speciale atentinda, nome, ke Komenio jam montras en ĝi, kian malhelpon en la internaciaj rilatoj kaŭzas lingvodiverseco, kaj samtempe pledas por la a r t e f a r i t a 1 i n g v o ĝenerale uzota de la tuta homaro.

Plej ĝisfunde pripensitajn planojn por la paca ordigo de la mondo prezentas Komenio en sia kulmina verko Ĝenerala konsulto pri la rebonigo de la homaj aferoj, instigante per ĝi ĉiujn bonvolemajn homojn kuniĝi por la venko de la paco. Li donas ankaŭ ĝeneralan instrukcion, kiel labori por tiu ĉi ideo. Komenio kredas, ke unu el la vojoj por atingi daŭran pacon sur la Tero, estas instruiteco de la tuta homaro. Tial 1i dediĉis multe da tempo al ĝeneralsciaj (pansofiaj) verkoj, kaj sopiris tiel enporti la spiriton de la reciproka kompreno en la labirinton de la konfuzita tempo.

La plej interesa kaj aktuala parto de la Ĝenerala konsulto estas sendube Panorthosia (Ĝenerala plibonigado). Ĝi skizas bildon pri la estonta tutmonda kunlaboro, pri la strukturo de la supera mondorganizo koncerne politikon, kulturon kaj religion. En la deksepa ĉapitro de la verko Komenio serĉas rimedojn, kiel konservi la pacon sen perforto, kiel bridi malicon de la fieraj kaj potencaj nacioj kaj unuopuloj. "A1 la esenco de la homeco", diras li, "apartenas sinkonduko perracia. . . ne agi laŭ la pasio, kolero, perforto aŭ armilo. En tio estas io besta kaj oni ne povas tion plu toleri."

Komenio ne povis neglekti konsekvencojn de la malegaleco de posedaĵoj kaj klasoj. Li konsciis, ke tiu ĉi malegaleco manifestiĝas ekz. en la rilatoj de la tiamaj ĉemaraj regnoj, Britio kaj Nederlando. En la Anĝelo de la paco li instigas la delegitaron ĉe la paca traktado en Breda (2) ke ĝi klopodu solsole atingon de la paco. Li avertas la traktantojn ne apogi sin je milito, kiu dezertigas urbojn, nuligas interkonsentojn. Ambaŭ ŝtatoj devus penti kaj reĝustigi sian pekon per la reciproka interpaciĝo.

La profitoj gajnitaj de ambaŭ potencoj per komercado devus esti dediĉitaj al la homoj suferantaj. Ve, se Komenio tiam estus veturinta al Breda, li propraokule konvinkiĝus, ke la avido pri kolonioj kaj pri mono entute superas la intereson pri la rebonigo de la mondo kaj pri la paco.

_

Komenio sciis, ke pro la ekonomiaj, naciismaj, lingvaj kaj rasaj motivoj la laboro porpaca estas ege malfacila kaj postulas multe da animforto, entuziasmo, kaj pacienco. Lia ideo, ke iam efektiviĝos la tuthomara frateco, restas daŭre viva kaj aktuala. La elstara filozofo Leibniz tiamaniere apostrofis la verkaron de sia samtempulo: "Venos, Komenio, tempo, kiam aro da nobluloj estimos vian faron kaj estimos ankaŭ la sonĝon de viaj esperoj".

## III. ARTEFARITA LINGVO LAŬ KOMENIO

Ŝtorma evoluo de la natursciencoj en la 17a jarcento sentigis mankojn de la ĝistiama universala scienca lingvo, la latina, kiu ne plu estis kapabla esprimi novajn pensojn kaj terminojn. Paralele kun la formiĝo de la novepokaj ŝtatoj oni pli kaj pli komencas aplikadi la naciajn lingvojn en ĉiuj sferoj de la homa scio.

Malgraŭ tio la manko de unu komuna lingvo estas daŭre sentata. Krei tian lingvon klopodis per siaj aprioraj projektoj ekzemple F. Lodowick (en 1652) aŭ Dalgarno (1661). La unua i. a. jene detaligas la esencajn trajtojn de sia verko: La lingvo destinita por ĝenerala uzo estu kiel eble plej facila por lernado. Tial ĝi evitu malregulecon.

La ideo anstataŭigi la naturajn lingvojn per pli perfekta kaj racia ilo okupis ankaŭ francan matematikiston kaj fizikiston R. Descartes (1596-1650): "Tiu lingvo", li skribas en 1629, "havus nur unu specon de konjugacio, deklinacio kaj vortkonstruo. . . La ŝanĝo de la verboj kaj la vortkonstruo devus esti formataj per aĥksoj. . ."

La vojon al la universala lingvo montras ankaŭ filozofo Leibniz (1646-1716), la alia elstara samtempulo de Komenio. Ĉiuj manuskriptoj de tiu ĉi filozofo rilate la mondlingvan problemon ampleksas proks. 1000 paĝojn. Laŭ li la universala lingvo "ne malpli servos entuziasmigi la racion ol la teleskopo servas por plifortigi la okulon".

Tamen abstrakteco kaj teorieca karaktero de tiutempaj lingvosistemoj estis la ĉefaj obstakloj por ilia praktika apliko.

En la 19-a ĉapitro de "Via lucis" (Vojo de Lumo) verkita dum lia restado en Britio Komenio skribas prl universala lingvo kaj pri ties neceso. La aŭtoro postulas, ke inter instruituloj restu konservitaj la hebrea, greka kaj latina lingvoj, kaj ke la nacioj konservu al si kaj kulturu ankaŭ siajn proprajn lingvojn. En la verko li esprimis la deziron pri lingvo tute nova, kiu estus pli facila, pli agrabla, pli perfekta ol ĉiuj lingvoj ĝis nun konataj.

En "Panglotio" (Universala lingvo), kies manuskripton trovis antaŭ la dua mondmilito prof. Ĉyževskij, Komenio eĉ per specimenoj vidigas, kiel li imagas la strukturon de la nova lingvo. (3) Tiuj ĉi specimenoj estas du-specaj. Plej ofte prenas Komenio kiel bazon vortojn latinajn kaj montras per ili, kiel artefarita lingvo simpliĝus kompare kun la komplikeco kaj nereguleco de la lingvoj ekzistantaj; due li prenas kiel specimenon vortojn novajn, kreatajn laŭ liaj principoj.

Kiel specimenon de la grupo, en kiu Komenio demonstras stajn proponojn sur bazo de materialo latinlingva, ni prenu la verbon e s t i. Verboj havas diversajn formojn laŭ personoj kaj laŭ tempoj. Tio estas senutila. Kial lerni diversajn finaĵojn7 Por indiki la personon sufiĉas simple la pronomo. Ni prenu la radikon de la latina verbo e s s e - e s ; ni konjugacios simple tiel, ke ni antaŭ la radikon metos personan pronomon:

***mi estas (sum) e g e s ni estas (sumus) m o s e s***

***ci estas (es) t u e s vi estas (estis) v o s e s***

***li estas (est) i 1 1 e s ili estas (sunt) i I 1 i e s***

Tute analogie oni povas simpligi la deklinacion; por kio estas la plej diversaj finaĵoj kazaj? Sufiĉas koni la deklinacion de la pronomo q u i s. Ĝiajn kazoformojn ni simple aligados al la vortradikoj; tiamaniere la deklinacio rilatos nur la pronomon kaj fariĝos unu-forma.

Ĉe adjektivoj ni ankaŭ havas senutilajn klopodojn pri deklinacio kaj diferenciĝo laŭ la sekso. Por tio suĥĉas nedeklinacieblaj partikuloj, tiel same, kiel oni metas adverbojn al verboj. Ankaŭ la numeraloj havos nek genron, nek nombron.

Ekzemplojn de la dua grupo, en kiu la specimenoj ne estas prenataj el latina materialo, sed estas elektataj laŭ novaj principoj, ni prenos el memstara suplememto de Panglotio: ĝi titolas "Provo pri nova harmonia lingvo".

Tie ĉi la pronomoj ne estas prenataj el la latina; sufiĉas por ili tri sonoj: mi - o, ci - e, li - i. Por esprimi ilian pluralon ne estas bezonaj novaj pronomoj; kial ne procedi ĉe ili egale kiel ĉe la aliaj vortoj? Ni aligos simple finaĵon de pluralo -n. Tiam estos: ni - on, vi - en, ili - in.

Ilia deklinacio estos tre simpla. La kazoj estu kvin: nominativo, genitivo, dativo, akuzativo, instrumentalo; vokativo ne estas bezona. La deklinaciajn finaĵojn formos la vokaloj i, e, a, o. Estos do jena deklinacio:

***O (mi) o oi oe oa oo***

***On (ni) on oni one ona ono***

***E (ci) e ei ee ea eo***

***En (vi) en eni ene ena eno***

***I ( li, ŝi, ĝi ) i ii ie ia io***

***In (ili) in ini ine ina ino***

Konforme al pronomoj estos deklinaciataj ĉiuj nomoj. Ekzemple se "El" signifus "dio", ĝia deklinacio estus jena (singularo kaj pluralo):

***el eli ele eIa elo***

***elon eloni elone elona elone***

Se estus kreita vorto e 1 a (diino), ĝi estus deklinaciata jene: ela (elan), elai (elani), elae (elane), elaa (elana), elao (elano).

En "Provo pri nova harmonia lingvo" Komenio jene efektivigas konjugacion de 1a verbo e s t i (ban), sen la helpo de la latina (a - mi, e - ci, i - li; pluralon esprimas longigo; á - ni; fa - futuro, pa - preterito):

**Prezenco**

***bana bane bani; baná bané baní***

**Preterito**

***pahana pabane pabani; pabaná pabané pabaní***

**Futuro**

***fabana fabane fabani; fabaná fabané fabaní***

Sumigante skribas Komenio en la fino: Nova lingvo devas esti tiom racia, harmonia kaj esence ĉioscienca, ke iu ĉiosciulo sukcesus ĝin renovigi, se ĝi estus perdiĝinta.

Ni ja ne havas la pansofion (4) kaj tial ni ne povas renovigi tiun nefinitan lingvon. Komenio mem starigas la samajn principojn en "Panglotio" kaj en "Provo", sed li prezentas al la leganto siajn pensojn por primedito. Hodiaŭ jam al neniu venos ideo konstrui artefarifan lrngvon laŭ skizoj de Komenio. Sed la sorto, kiu tiomfoje trafis lin maljuste, maljustis al li ankaŭ per tio, ke lia Panglotio restis dum jarcentaj perdita.

## IV. KOMENIO EN LA SPEGULO DE LA 20-a JARCENTO

Ekzistas diversaj difinoj de la nocio LA LINGVO. Da ili estas tuta gamo, sur kies dekstro estas la difino de dro Ben Johnsun (1573-1637): "La lingvoj estas la genealagio de la nacioj". (La angla estas la plej evidenta ekzemplo por tiu ĉi difino.). Sed sur la maldekstra flanko de la gamo estas alia difino: "La lingvo estas la interhoma komprenilo", kiu lastatempe ricevas iom pli precizan formon, nome "La lingvo estas la rimedo por konatigi la informojn". - Sur ĉiuj punktoj de la terglobo vivas homoj, laborantaj sur la sama scienca aŭ teknika problemo. Ĉu eblas efika kunlaboro, se ĉiu el ili publikigas en alia nacilingvo?

La distribuado de la informoj okazas ankoraŭ nun per amaso da maltaŭgaj nacilingvoj, ĉefe per la angla. Sed la informadiko bezonas lingvon alian, precize planitan, laŭ la Panglotio, la lingvon Zamenhofan. Kontraŭ la latina la angla havas kelkajn avantaĝojn. Dank' al sia origino, nome obla hibridiĝo inter diversaj keltaj, germanaj kaj romanidaj lingvoj, ĝi perdis dum sia historio multajn gramatikajn delikataĵojn, kiuj sin montris senutilaj (la tri genrojn de la germana, la komplikegan konjugacion de la franca). Sekve ĝi povas facile formi kunmetaĵojn kaj derivaĵojn kaj adopti alilingvajn vortojn mallongigante ilin. Sed kontraŭ tiuj kelkaj avantaĝoj oni devas starigi ankaŭ la malavantaĝojn, kiuj estas sennombraj. La lingvo havas nenian fiksan fundamenton, ĝi kreskis kaj kreskas arbitre kaj libervole. Sekve ĝia vortaro enhavas neimageblan inundon da sinonimoj kaj homonimoj: preskaŭ ĉe ĉiu vorto en la vortaro oni trovas du, tri eĉ 30 nociojn sen preciza difino. La gramatikaj reguloj kaj esceptoj atingas triciferajn nombrojn, kiuj ĉiam ankoraŭ kreskas. Laŭ la aserto de la angloj mem oni bezonas 15 mil laborhorojn por atingi la plenan posedon de la lingvo, sed unuavice oni devas nepre vivi kelke da jaroj en Britio por ekregi la fonetikon kaj melodion de la lingvo.

Apartan ĉapitron meritus la nekredeble sensenca diferenco inter la skribado kaj parolado. Estas apenaŭ kredeble, ke la popolo, kies anoj malkovris la leĝon pri la universala gravito kaj inventis la vapormaŝinon, ĝis nun ne perceptis la avantaĝojn de la alfabeto, se ĝi estas uzata unuece.

En la tempo de Komenio ekzistis internacia lingvo, servanta al ĉiuj tiamaj kleruloj, nome la latina. Komenio mem perfekte regis kaj flue uzadis ĝin, lia tuta verkaro estas verkita en ĝi. Kaj spite al tio post sia dumviva sperto li devis konstati, ke tiu ilo ne estas perfekta. Oni devis esti tre kuraĝa viro por klare proklami tian "herezaĵon" en la tempo de la Sankta inkvizicio, ĉar la latina estis la lingvo de la katolika eklezio. Hodiaŭ oni havas feliĉon vivi en tute alia epoko, proksimiĝanta jam esence al multaj celoj de la pensado de Komenio. Oni havas jam la Internacian Lingvon de Zamenhaf, kiu plenumas ĉiujn postulojn de Komenio kaj krome ĝi estas elprovita per 87 jara ĉiuflanka uzado.

## V. ELDIROJ DE KOMENIO PRI UNIVERSALA LINGVO

### 1. Vojo de Lumo ( 5 )

Neeviteble do ankaŭ nun, kiam oni serĉas renovigon de la tuta mondo kaj oni esperas ĝin, necesa estas la helpo de lingvoj, t. e. bezono aŭ dono de iuj ajn lingvoj por tiuj, kiuj disdividos tiun ĉi lumon de saĝo (6) aŭ de iu sola lingvo komuna por ĉiuj nacioj. Eĉ se ambaŭ ĉi-manieroj ŝajnus neeblaj, tamen ne estas tiel, sed la dua maniero estas pli facila ol la unua. Ĉar estas pli facile, ke ĉiuj lernu unu kroman lingvon ol unuopulo ĉion, se kompreneble oni estas atingontaj la celon per homaj laboro kaj klopodo.

Certe do kleraj homoj devos pripensi manieron, pere de kiu ili facile povos akiri scion de iuj ajn lingvoj, t. e. de ĉiuj lingvoj de tiuj nacioj, kun kiuj oni havos kontakton, aŭ por ke ili konstruu ian unusolan lingvon, kiun ili uzos ne nur en sia reciproka rilato, sed ankaŭ povos facile instrui al ĉiuj, eĉ al la plej malkleraj. Pri kiu ajn el tiuj du vojoj ili decidos, helpe de Dio rezultos iuj avantaĝoj.

Plene tamen estas necese preferi la duan vojon, ke estu kreita iu lingvo komuna por la tuta mondo. Ĉar per ĝi ĉiuj komprenus sin reciproke pli bone, uzante la samajn vortojn, kaj tio estos eĉ unuarigarde klara signo, ke tiu ĉi universala lumo trapenetris al ĉiuj; klopodoj pri klerigo pli firme ankros ĉe ĉiuj kaj pli sekure disvastiĝos al la posteuloj. Kaj iu, kiu volos, povos vojaĝi tra iuj ajn regionoj kaj mondopartoj kaj komprenos ĉlujn kaj ĉiuj komprenos lin.

Sed ĉar tiu ĉi komuna peranto de la nacioj devas esti por ĉiuj sufiĉa, agrabla kaj aminda, por neniu malfacila kaj neŝatata, kaj ĉar ni tian peranton jam devas serĉi, mi ne povas ne citi ĉi tie konsiderojn de Ludoviko Vives (7), kiu ankaŭ deziris unu lingvon por la tuta mondo. . . Ĉar lingvo, kiel li diras, estas kaj instrumento de la homa socio kaj trezoro de klereco, estus utile por la homa gento, ke estu unu lingvo, per kiu ĉiuj nacioj povos paroli. Sed li aldonis: "Kaj el tiuj lingvoj, kiujn ni nun uzas, la latina ŝajnas al mi tia lingvo. . . "

Ni konsentas kun li nur tiugrade, ke ni konsideras unu lingvon komunan necesa por la mondo. Kaj se ne estus iu alia lingvo, estus konvene difini por tiu ĉi bezono prefere la lingvon latinan antaŭ iu el la ceteraj lingvoj. Sed ĉar niaj konsideroj nun strebas pli alten, ni ne povas agi alie, ol rekomendi prefere lingvon tute novan.

Por tiu ĉi afero ni havas jenajn motivojn:

Unue, per universala lingvo oni devas helpi al ĉiuj egalrajte. Per la latina lingvo ni helpus plej multe nur al ni, kiuj ĝin jam regas, ne ankaŭ al malkleraj nacioj, kiujn ni devas ĉi tie prefere konsideri, ĉar ili signifas la pli grandan parton de la mondo. Por ili la latina lingvo estas, same kiel la aliaj lingvoj, aŭ eĉ pli, kaj nekonata, kaj malfacila. Ĝi postulas nome tre laborstreĉan multjaran zorgon kaj koncentritan diligentecon, kiel spertas tion nia junularo kaj kiel montras

tion la konstruo mem de tiu ĉi lingvo. Ĉar ĝi estas plena je diversaj 1) kazoj de nomoj, 2) tempoj kaj modoj de verboj, 3) konstruoj en sintakso, kaj en ĉio ĉi abundas je plej nombraj neregulaĵoj.

Due, la universala lingvo devas esti el ĉiuj la plej riĉa, ĉiuflanke kontentiga, por ke ĝi taŭge sencotrafu ĉiujn aferojn kaj facile esprimu ĉiujn imagojn de la menso. Ke tia ne estas la latina lingvo, tion ĝi konfesas mem, ĉar ĝi estas malriĉa je kunmetaĵoj (8) kaj ne tre fekunda rilate al derivaĵoj (9). Tial ĝi pruntas tiom da vortoj de ekstere, precipe el la greka. . Kaj tiel forlasante unuecon kaj simplecon kaj ne atingante perfektecon, kian ni serĉas, ĝi sufiĉas nek al si, nek al la objektoj.

Fine - kaj tio estas la ĉefa celo - la universala lingvo devas esti universala medikamento kontraŭ konfuzo de nocioj. Tio ne povas okazi alimaniere, ol ke ĝi progresos paralele kun la aferoj, havante nek pli, nek malpli da vortoj ol kiom ekzistas da nocioj, kaj ke ĝi ligos vortojn tute precize nur laŭ tiu ordo, per kiu estas ligataj inter si la aferoj, nome tiel, ke jam la sono mem trafu la esencon de la aferoj kaj prezentu ĝin al la menso. Tion ĉi atingas la latina lingvo same malsufiĉe kiel iu ajn lingvo alia.

Ĉar la homoj de pli fruaj tempoj, la kreintoj de la lingvo, kiu konserviĝis al ni, ne estis observantoj de la aferoj sufiĉe precizaj por observi ĉiujn diferencojn kaj esprimi ilin per vortoj trafaj kaj konvenaj. Ili kontentis povante esprimi aferojn konatajn kaj ordinarajn. Ja tre multaj vortoj aperis ĉe ili eĉ hazarde kaj sen iu motivo; ili uzis ilin por signi tiun aŭ alian aferon. Ja eĉ malan nocion ili esprimis per la sama aŭ simila vorto kaj inverse 1a saman nocion per vorto mala. De tie originas ĉie abundo da homonimoj, sinonimoj, paronimoj, tropoj, figuroj, prerifrazoj (10) aŭ dusencoj, superfluaĵoj kaj konfuzoj.

E1 tio do rezultas la konkludo, ke kontraŭ tiuj multnombraj malhelpoj kaj konfuzoj de reciproka rilato, kiuj ekestas el multnombreco, malfacileco kaj malperfekteco de la lingvo, ne restas pli efika rimedo, ol konstrui novan lingvon, kiu superos ĉiujn jam konatajn lingvojn, estante I) pli facila, por ke ni povu lerni ĝin sen perdoj tempaj kaj materiaj, 2) pli ĉarmasona, por ke estu ĝoje lerni kaj ellerni ĝin, 3) pli perfekta, tiel perfekta, kiel estas nur eble laŭ la karaktero de la aferoj...

Ni sopiras do la lingvon 1) plene racian, kiu laŭ la fakta kaj formala vidpunktoj havu en si nenion alian, ol tion, kio servas por esprimo de senco ĝis la plej malgrandaj detaloj, 2) analogan, kiu enhavus en nenio neregulaĵojn, 3) harmonian, kiu ne enportus inter aferojn kaj nociojn iujn misproporciojn, ĉar ĝi jam per la sono esprimus sencon kaj diferencigajn signojn de la aferoj. . . Ĉar nur tiam la epoko povos sin nomi klerigita kaj paca, kiam lumo kaj paco estos en aferoj, en nocioj de la aferoj kaj en vortoj, reprezentantoj de nocioj.

---

Se iu demandus pri Ia maniero, per kiu oni povus ĉi tiun lingvon krei, do proponas sin du manieroj, nome aŭ sub gvido de lingvoj jam konataj, aŭ sub gvido de la afero mem. La unua maniero estus laŭ la modelo de Zeuxis (11). Li, intencante pentri Helena'n, kunirigis knabinojn elstare belajn, kiom li nur povis akiri; ĉion li sur ili atente pririgardis, kaj transportis al sia Helena ĉiam tiun korpoparton, pri kiu li konstatis, ke per ĝi iu knabino multe superas la aliajn,

kaj per ĉi tiu maniero li feliĉe esprimis ian pramodelon de la plej perfekta ĉarmo. Io simila povus okazi ankaŭ en nia kazo, se ĉio, per kio iu lingvo elstaras en precizeco, beleco kaj esprimivo, kaj apenaŭ iu estas tiel malfeliĉa, ke ĝi en io speciale ne superus la aliajn, . . . tion ĉion se oni kolektus kaj harmonie kunigus en unu lingvon, por ke el pluraj ĉarmoj ekestu kvintesenco de ĉiuj ĉarmoj.

Sed la dua maniero estas pli afertrafa, nome ke kunmetontoj de la nova lingvo sekvu gvidon de la aferoj mem, precipe se ĉio devus esti adaptita al ties preciza esprimado. Ĉar nur en tiu ĉi kazo estos harmonio ĝusta kaj facila. La aferoj mem, sin prezentantaj al la sensoj de ĉiuj homoj per la sama maniero, faros tiun ĉi lingvon por ĉiuj facile komprenebla kaj imitebla. Mersenne (12) kaj Le Maire (13), kiuj estas el la plej erudiciaj francoj, opinias, ke ili jam feliĉe metis la fundamenton de tia lingvo. Ili fidas, ke per ĝi ili interkompreniĝus ne nur kun iuj ajn loĝantoj de la mondo, sed ankaŭ kun loĝantoj de la Luno, se ili ekzistas. Ni, bazante nin sur fundamentoj de universala saĝo, aŭdacas esperi pri lingvo, kiu estus dekoble pli facila ol la latina, ĉar ĝi estus tute libera je ĉiuj neregulaĵoj. Kaj centoble pli perfekta, ĉar ĝi kapablus senpere esprimi ĉiujn nuancojn de aferoj kaj nocioj. Kaj miloble pli konvena por la harmonia esprimo de la esenco de la aferoj, ĉar ĝiaj unuopaj vortoj estus kiel difinoj, estante kreitaj laŭ numeroj, mezuroj kaj pezoj de la aferoj mem.

Ŝajnas, ke provizore estas necese rekomendi jenajn du aferojn:

a) Unue, ke la sciencaj lingvoj, konsekritaj per la surskribo de la Kruco de Kristo, restu en la uzo de la sciencistoj: la lingvoj hebrea kaj greka precipe kiel fonto de la Dia Skribo, kaj la latlna, ĉar ĝi entenas trezorojn de tiom da brilaj spiritoj.

b) Due, ke nacioj konservu kaj kulturu ankaŭ siajn proprajn lingvojn, ke ĉiu spirito laŭdu Di-Sinjoron kaj ĉiuj lingvoj kantu al Dio. (Ni lasas al evoluo, ĉu tio estos konvena al tiuj, kiuj, provinte plene ĉi tiun plej ĉarman lingvon, ne povos poste ne timegi siajn barbarajn kaj krudajn lingvojn. )

**2. Panglotio** ( 14 )

Postuloj al la perfekta lingvo:

1) Ĝi ampleksu per sia terminaro la tutan sferon de aferoj (videblaj kaj nevideblaj),

2) Ĝi adaptu ankaŭ kompletan signaron por indiki le aferojn,

3) Ĝi harmoniigu la tutan aron da nuancoj (kiujn oni povas observi ĉe sonoj).

La perfektan lingvon. . . ni povas atendi nur de la universala scienco kaj universala edukado, t. e. de la plena kaj perfekta sistemo de la aferoj.

Ni devas nepre serĉi lingvon novan, kiu estus la plej perfekta sub la ĉielo, sekve tian, kiu

I) per sia riĉeco devas respondi al la amplekso de la aferoj kaj disponi per ĉiaflanka varieco de la signoj,

2) per kvalito de siaj strukturoj ĝi devas respondi al la strukturo de la imagoj kaj esti tiamaniere la plej akurata peranto de la nocioj de menso al menso. . .

3) sed samtempe ĝi devas esti tre facila en si mem; ĝi ja estu tute regula, per neniaj malregulaĵoj makulita aŭ konfuzita.

Tiuj ĉi tri ecoj rezultas el la ĝeneraleco, simpleco kaj sistemeco.

Ni konceptis do, en niaj deziroj, la bildon de lingvo superanta ĉiujn ĝis nun uzatajn, eĉ centoble pli facila, agrabla kaj perfekta.

1) De lingvo pli facila, por ke oni povu lerni ĝin sen vana perdo de tempo.

2) De lingvo pli agrabla, por ke oni gaje lernu kaj regu ĝin.

3) De lingvo pli perfekta, por ke ĝia kono tre kontribuadu ankaŭ al la kono de la aferoj, sekve por ke ĝi povu fine fariĝi komuna por la tuta mondo. .

La plej altaj leĝoj por la nova lingvo, por ke ĉio estu precize dividita, sen konfuzo, estas do:

1) Kiom da aferoj, tiom da vortoj, nek pli, nek malpli, kaj ĉiu nova afero havu novan vorton.

2) Diferenco en la afero havu diferencon en la vorto. Do neniuj vortoj povas esti ambaŭgenraj t. e. epicenaj.

3) Por simpla afero simpla vorto; por kunmetita afero kunmetita vorto;

4) Substanca afero donu al la vorto la karakteron de substanteco, adjektiva la karakteron de adjektiveco, manka la kara'kteron de manko.

5) Diferenca kazo de la sama nomo aŭ diferenca formo de la sama verbo havu diferencan finaĵon, ke nenio koincidu kun la alia aŭ kaŭzu konfuzon en la kunteksto.

Principo: kio ajn havas alian signifon, havu alian formon.

Tamen ne sufiĉas krei novan lingvon. Miloj da ili povas konstruiĝi, unu pli bela, riĉa kaj facila ol la alia. . . Sed se iuj provos fari ĝin sen havi antaŭ siaj okuloj finan celon. . . la ĥaoso ne malaperos, sed konstante daŭros. Ĝi ne malpliiĝos, sed pligrandiĝos.

**Notoj**

(1) Unuiĝo de Fratoj (latine Unitas Fratrum) - ĉeĥa reformacia eklezio fondita en 1457. Ĝiaj adeptoj devis vivi laŭ la instruo de la Biblio, en severa morala disciplino kaj libervola malriĉo. J. A. Komenio estis la lasta episkopo de la Unuiĝo.

(2) Breda - urbo en la suda parto de Nederlando.

(3) A1 la problemo de la universala lingvo estas dediĉita i. a. ankaŭ la 14-a ĉapitro de "Panorthosia" (Universala Reformo), alia volumo de la "Ĝenerala Konsulto". Ĝis nun estis konataj inter esperantistoj nur kelkliniaj citaĵoj el ambaŭ verkoj.

(4) "Pansofia" (Universala Scienco) - provo pri kreo de harmonia sistemo de sciencoj. La sistemo enhavas la sumon de homaj scioj ĉiufakaj. Laŭ la vidpunkto de Komenio pansofio devis esti elirpunkto por ekkompreno de la mondo kaj rimedo por la reformo de la homa socio.

(5) Vojo de Lumo ("Via Lucis"), eldonis Ŝtata Pedagogia Eldonejo, Prago 1981. La 19-a ĉapitro estis parte publikigita en "Revuo Esperanto", majo 1970.

(6) Sub "lumo de saĝo" komprenu "universalan saĝon".

(7) Ludoviko V i v e s (1492-1540), hispana humanisto.

(8) A1 Komenio ŝajnas la latina lingvo malriĉa je kunmetaĵoj kompare ekzemple al la germana.

(9) Sub derivaĵoj Komenio komprenas vortojn derivitajn de la sama radiko.

(10) homonimo - vorto, kiu havas la saman formon kiel alia, sed malsaman sencon; sinonimo - vorto havanta ĝuste la saman sencon kaj uzatecon, kiel unu alia en tiu sama lingvo; paronimo - vorto preskaŭ samsona kiel alia, sed sence malsama; tropo - vortfiguno; figuro - lingva procedo, kiu igas la penson pli frapa, reliefigante la esprimon; perifrazo - ĉirkaŭfrazo.

(11) Z e u x i s - greka pentristo, vivis en la dua duono de la 5-a jarcento a. n. e.

(12) M. Mersenne (1588-I848), franca matematikisto, teologo kaj filozofo.

(13) Le Maire, hodiaŭ forgesita franco, eltrovinto de la internacia alfabeto.

(14) Johano Amoso Komenio: Selekto el Ĝenerala Konsulto pri la Rebonigo de la Homaj Aferoj, eldonis Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj, Prago 1954.

(15) Aŭtoro de la IV-a ĉapitro estas E. Felix

Malgraŭ la ĝisnuna kutimo oni uzadas en la teksto de la broŝuro la formon "Komenio" rekomenditan de la recenzinto Vuk Echtner, estro de Lingva Komisiono de ĈEA. Li motivigas ĝin jene:

La tendenco pri ĝisfunda internacieco de la stilo igas nin rekomendi la formon K o m e n i o (en "Johano Amoso Komenio" k. c.) anstataŭ "Comenius", "Komenský". Ni trovis post traanalizo, ke ne ekzistas kaŭzo ne meti tiun formon - kaj plene kompetentas la Esperantigo de Ia latina "Comenius" laŭ vojo jam elprovita ĉe aliaj similaj nomoj el la sama tempo, kiam la latina regis kaj procedis kiel universala lingvo; nun tiun sferon regas Esperanto, kaj ĝi rajtas kaj devas enkonduki tiajn formojn laŭ la samaj bezono kaj regulo.

---

KOMENIO KAJ LA INTERNACIA LINGVO. Eldonis Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Praha, 1974, okaze de la jubilea jaro de la ĉs. tutmonda pacmovadoj. Kompilis O1dřich Kníchal. Fragmentojn el la verkoj de J. A. Komenio esperantigis d-ro V. Novobilský kaj O. Kníchal. - Represo aŭ traduko, ĉu kompleta aŭ parta, sub la kondiĉo, ke la fonto estos indikita. Aperas kiel ekstra represo de PACO.